

Verschiĝnt maandelijks
Veertiende jaargang
N u m m e r 5 (155)
M E I 1947

Vertegenwoordiger in Nederland :
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO
W. Buytenwechstr. 128 C., Rotterdam-W.
Postrekening 272818 van N. E. C.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden : min. 125 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Nederland : 4 fl.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

Babilado

Jes, karaj Liganoj, se ni ĉiuj ne pre deziras, nia Flandra Ligo Esperantista povas iĝi tre grava kaj impona kulturcela societo en Flandrujo, simila al la Flandra Turista Ligo (V.T.B.), la Flandra Junulgasteja Centralo (V.J.H.C.), la Centralo por Popoldanco en Flandrujo (V.D.V.V.) k.m.a. pri kiuj ĉiu scias kaj fieras en nia lando.

Por tion atingi necesas ke nia F.L.L.E. kondutu ne kiel apartiĝema, kiel esetora aro rilate la ne-Esperantistoj, sed kiel larĝvida kaj entreprenema societo por la propagando de Esperanto inter la Flandrojn.

Necesas ankaŭ ke niaj Lokaj Sekcioj kaj ke niaj Lokaj Rezentantoj akiru klaran komprenon pri propra rolo kaj konduto kiel partoj, kiel *eretoj* de nia landa Ligo. Ili ĉiokaze kaj ili ĉiurilate agadu nome de Flandra Ligo Esperantista. Por la ne-esperanta mondo ne ekzistu iu « Paco kaj Justeco » en B. aŭ iu « Flandrema Grupo » en A. La ne-esperantisto konu nur la V.E.B. (Vlaamse Esperantisten-Bond), ankaŭ kaj precipe pere de la Lokaj Sekcioj kaj Rezentantoj!

Nur kiam tiuj tri literoj V.E.B. estos *spontanee* komunuzaj al ĉiu el ni, ni povos certi pri bona, unuece agordita spirito en F.L.L.E. Kaj nur kiam la ne-esperantistoj scios pri ilia signifo, nia F.L.L.E. egalrangos kun la aliaj kulturcelaj organizaĵoj en Flandrujo.

Diskonigu do vian Ligon! Varbu al ĝi la disajn, neorganizitajn flandrajn esperantistojn! Kaj varbu al ĝi AMIKOJN! (Pri tio vi legos aliloke en tiu ĉi numero).

Reciproke niaj Lokaj Sekcioj kaj Rezentantoj trovu ĉe F.L.L.E. moralan, materian kaj eĉ financon helpon. Ili ja povas troviĝi antaŭ taskoj kiuj superas iliajn lokajn kapablojn kaj rimedojn. Kaj en tia eventualeco ili devas senti ke ili ne izole staras, sed formas integralon kun la tuta F.L.L.E.

Jen, karaj Liganoj, je kio mi tutspeciale deziris tiri vian atenton.

Krom tio, ni ĝoju ke post interrompo ni akiris la daŭrigon de nia radio-kurso, per kiu nun centoj da novaj esperantistoj formiĝas en Flandrujo kaj kiujn ni prilaboras por F.L.L.E.

Alia ĝojiga novaĵo estas la restariĝo de niaj Sekcioj en Oostende kaj Gent. Ni estas konvinkitaj ke la vera F.L.L.E.-spirito animos ilin. Tre baldaŭ ni verŝajne povos saluti novajn Sekciojn kaj Rezentantojn en pluraj aliaj lokoj. Sed ni ne anticipu diskonigu ĝojigan novaĵon...

Ni finas salutante : Ĝis la revido dum nia Kongreso!

Via Sekretario :
Gr. Maertens.

REDAKCIOJ!

Interŝanĝekzemplerojn de via gazeto sendu al nia redakcia adreso : Postbus 342, Brussel.

XII-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista Mechelen, Pentekoston 1947 (24-25-26 majo)

LASTA ALVOKO!



Nur kelkaj tagoj, tre baldaŭ nur kelkaj horoj disigas nin de Pentekosto kaj de nia dua postmilita Kongreso. Por la tutlasta fojo ni instigas ĉiujn membrojn de Flandra Ligo Esperantista al partopreno. Neĉeesto estus neriparebla neglekto. Alĝebleco ankoraŭ ekzistas. Prenu decidon tuj!

Ankaŭ la Liganojn, kiuj pro iu kaŭzo ne povos partopreni nian XII-an Kongreson, ni invitas pagi la kongreskotizon. Per tio ili grava kunhelpas al la sukceso kaj ni sendos al ili kompanse, krom ĉiuj kongresdokumentoj, ankaŭ unu kongresfoton memorige.

Pasintan jaron venis al nia Kongreso tri Nederlandanoj. Nunjare ili estos kelkdekope! Niaj Kongresoj montriĝas denove nerezisteblaj magnetoj por translimaj esperantistoj. Bona aŭguro!

La kongresprogramon ni sampaĝe publikigas. Etaj ŝanĝoj estas rezervitaj, kvankam ili estas tute malverŝajnaj. Pro ampleksigo ni ne kapablos sendi antaŭ la Kongreso la Kongreslibron al la aliĝintoj. Ili ricevos ĝin en la akceptejoj.

Cirkulerojn, aliĝilojn kaj ĉiujn informojn donas la Kongresa Oficejo : Geerde-gemvaart 69, Mechelen.

La Kongreskomitato.

PROGRAMO

SABATE :

- 14.00 Malfermo de la Akceptejoj, de la Kongresa poŝtkontoro kaj de la E-Ekspozicio en la Urba Teatro (Keizerstr.).
- 15.00 Akcepto de la ĵurnalistoj en la Akceptejoj.
- 17.30 Prelego de F-ino M.J.Top en « Royal » (Grote Markt) pri : « Skizo pri la Sekcia Vivo en la kadro de Flandra Ligo E-ista ». Enkondukas : D.ro T. v. Gindertaelen.
- 18.00 a) Speciala Sonorilara Koncerto de la urba sonorilaristo
b) Vizito de la urbo. Gvidas : P. Varens (foriro de « Royal »).
- 18.30 Kunveno de Flandra Esperanto-Instituto en la Akceptejoj.
- 19.30 Fermo de la Esperanto-Ekspozicio. La Akceptejoj translokiĝas al « Royal ».
- 20.000 Oficiala Malfermo de la Kongreso kaj Interkonatiĝa Festo kun Balo en « Royal ».

DIMANCE :

- 9.00 a) Malfermo de la Akceptejoj, de la Kongresa poŝtkontoro kaj de la E-Ekspozicio en la Urba Teatro (Keizerstr.).
b) Katolika Diverso kun Prediko en Esperanto de P.M. A. Beckers en la Kapelo de la Normallernejo (St. Rombauts Kerkhof).
- c) Vizito de la Kongresurbo.
- 10.15 La Urbeŝtaro oficiale akceptas la Kongresanojn en la legejo de Volksbibliotheek (Gebr. Verhaeghenstr.).
- 10.45 Ĝenerala Jarkunveno de Flandra Ligo Esperantista en la legejo de Volksbibliotheek.
- 11.00 Definitiva fermo de la Akceptejoj kaj de la E.-Ekspozicio.
- 12.30 Komuna fotografiĝo en la Botanika Ĝardeno.
- 13.00 Komuna tagmanĝo en la etaĝa salono de « Royal ».
- 15.30 a) Vizito de la urbo. Gvidas : P. Varens (foriro de « Royal »).
b) Kunveno de la Estraro de Flandra Ligo en « Royal ».
- 17.00 Prelego de D-rando F. Roose pri « E. en la Moderna Tempo » en « Royal » Enkondukas : D.ro T. v. Gindertaelen.
- 18.00 Kunveno de la partoprenantoj en la Karavano de Flandra Ligo E-ista al la Universala Kongreso (Bern) en « Royal ».
- 19.00 Esperanta Festvespero kaj Esperantista Kabaredo pri-zorgita de la F.L.L.E.-Sekcio Brugge en « Royal ».

LUNDE :

- 10.00 Aŭtobusa forveturo al Liero (kunveno sur Grote Markt).
- 10.30 Promenado tra Liero kaj vizito de la Zimmerturo.
- 12.30 Komuna lunĉo.
- 14.00 Vizito de la Caroly-muzeo kaj aliaj vidindaĵoj.
- 16.00 Reveturo al la Kongresurbo.
- 16.30 Oficiala Fermo de la Kongreso — Adiaŭo en « Royal ».

TRIA LISTO DE ENSKRIBINTOJ

101. S-ino M. Volders, Antwerpen; 102. E. Dhaenens, Oostende; 103. F-ino A. Beerden, Hasselt; 104. F-INO DORIS FALL, LONDON (Eng.); 105. F-INO E. NIJSSEN, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 106. F-INO R. MAES, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 107. S-INO F.V. LITH, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 108. J. V.F. LITH, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 109. F-INO VOGELS, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 110. J. OERLEMANS, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 111. F-INO E. THISSEN, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 112. F-ino J. Terrijn, St. Amandsberg; 113. S-ino A. Liegiest, St. Amandsberg; 114. F-ino Van Mullem, Blankenberge; 115. F-ino Aesaert J., Blankenberge; 116. A. Cognie, Kortrijk; 117. J. Jacobs, Antwerpen; 118. F-ino J. Nolf, Brugge; 119. F-ino D. Robert, Ukkel; 120. J. Van Tuyckom, Hemiksem; 121. S-ino L. Van Tuyckom, Hemiksem; 122. F-INO J. VAN EEKEREN, BERGEN-OP-ZOOM (Ned.); 123. P. H. Mooij, Ukkel; 124. S-ino E. C. Ernst, Ukkel; 125. Pastro A. Beckers, Mechelen-aan-Maas.

ĜIS BALDAŬA REVIDO AŬ INTERKONATIĜO!



Onze flanken gedekt!

Bij het werven voor onze organisatie staan we al te dikwijls machteloos tegenover de redelijke opwerpingen van personen die weliswaar een oprechte sympathie voor onze beweging koesteren, maar wegens tijdgebrek, gemis aan aanleg of andere omstandigheden zich niet aan de studie van Esperanto wagen. Zij gaan voor de V.E.B. verloren en meteen verliezen we soms uitstekende elementen, die onder stoom gehouden wellicht vroeg of laat toch bij ons zouden staan, of dit onmiddellijk zouden doen *ware in de schoot van onze vereniging voor hen een plaats voorzien.*

Niet alleen wij zijn tot deze bevinding gekomen, Oostenrijk gaf het voorbeeld en stichtte een jaar geleden het « Oosterr. Gesellschaft der Freunde des Esperanto » dat onmiddellijk tot een verheugende bloei kwam. Op dit ogenblik bestaan reeds in een zestal landen dergelijke verenigingen.

Ook de V.E.B. besloot haar flanken te dekken door een campagne op touw te zetten voor het werven van « Vrienden van de Vlaamse Esperantisten-Bond ». Komen hiervoor in aanmerking in de eerste plaats al wie, zonder bepaaldelijk Esperanto machtig te zijn, onze zaak genegen is. Verder ook wel nieuwelingen, die na de geldelijke opoffering voor het volgen van een beginkursus en de uitgaven voor het nodige leermateriaal, terugschrikken voor de lidgelden voor Bond en Afdeling. In feite zijn zij aspirant-leden die later wel de weg naar onze vereniging als lid zullen vinden.

De V.E.B. telt dus *Leden* en *Vrienden*. De Vrienden kunnen aan het verenigingsleven van Bond en Afdeling deelnemen, begrijpelijk zonder de rechten te genieten die aan de Leden voorbehouden blijven. Zij betalen een geringe contributie: 15 fr. Geldt het *Vrienden* door een Afdeling of een Vertegenwoordiger gewonnen, dan wordt slechts 5 fr. aan de bondskas afgedragen : het verschil komt de afdeling of de Vertegenwoordiger ten goede, die het voor Esperanto-doelinden zullen aanwenden.

De kaarten voor de V.E.B.-Vrienden liggen klaar en kunnen besteld worden door onze Afdelingen en Vertegenwoordigers à 5 fr. te storten op postrekening 2321.50 van de V.E.B., Brussel (de reden der storting steeds op de strook vermelden!). De kaarten krijgen ze ongevuld toegezonden. Onze Afdelingen en Vertegenwoordigers zullen ze zelf invullen en aan de betrokken personen overhandigen. Een lijstje met namen en adressen aan het Bondssecretariaat is echter welkom.

Door deze regeling wordt ons werf-terrein oneindig uitgebreid : we kunnen nu vrijwel iedereen voor de V.E.B. werven ! Afdelingen, Vertegenwoordigers V. E.B.-leden zet onmiddellijk de campagne in ! Bestel een flink aantal kaarten ! Helpt onze flanken dekken !

Gr. Maertens.

OBSERVOJ



PRI DEMOKRATIO
«Eternan gloron al la granda demokrato Zamenhof!» proklamas Esperanto-gazeto, kiu ĉiukolone almenaŭ plurfoje uzas la nun bontonan epiteton DEMOKRATA.

En la sama numero ĝi agitas por la «zorga esplorado de ĉiu esperantisto» kaj por la «purigo de niaj vicoj per la forigo de ĉiuj maldemokrataj individuoj».

En «Deklaracio pri Esperantismo», prezentita al kaj adoptita de la unua Universala Kongreso, Zamenhof diras: «Esperanto estas nenies proprujo, nek en rilato materia, nek en rilato morala... Esperantisto estas nomata ĉiu persono kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiuj celoj».

Sed Zamenhof ne estis pseŭdodemokrato... **PIK.**

F. TIMMERMANS EN ESPERANTO.

De ons te vroeg ontvallen, veelgelezen vlaamse auteur was een goed vriend en warm voorstander van het Esperanto. Niet alleen werd veel van hem in de internationale taal vertaald en uitgegeven, maar hij aarzelde niet eigenhandig zijn werk in Esperantoversaans met aangepaste tekeningen te verlichten.

Nog kort voor zijn heengaan had hij het plan opgevat een nieuw Driekoningsverhaal te schrijven: «Ze zouden uit den vreemde komen en zich in Vlaanderen ontmoeten, ze zouden Esperanto spreken en bij ons de waarheid vinden...»

«Veel succes voor Esperanto, en tot weerziens», luidde zijn afscheid aan de Esperantoversaans van zijn «Driekoningsverhaal» met wie hij het plan besproken had.

In een aanstaande nummer wijden we een pagina aan F. Timmermans, zijn leven, zijn werk... en zijn grote sympathie voor het Esperanto.

EEN NIEUWE BABEL?

«Esperanto is moeilijk. Leer dus Ido! — Of liever Novial! — Volmaakt is pas Occidental! — Nog beter Latino sine flexione! — Waarom Uw tong te breken over lastige klanken? Blijf bij het beproefde Volapük!... Leer Nal Bino... Menet's Systeem... Bopal... Veltparl... Langue Bleue!... Wees practisch. Sluit U aan bij een bestaande wereldtaal; Spreek Basic English! — Vergeet Frankrijks Roem niet: verkies Anglo Franca! — Vergeet Deutschland niet: verkies Tutonish of Anglo-German! — Vergeet Rusland niet: verkies Panslav!...» schrijft Prof. Dr W.G.S. Hellinga in «Hogeschool en Volk» en gewaagt, schijnbaar terecht, van een nieuwe Babel.

ER ZIJN ER NOG...

In 1927 waren reeds 520 al dan niet volledig uitgewerkte kunsttalen geregistreerd en Prof. Hellinga had bijgevolg nog heel wat namen kunnen noemen... Het is het beproefde middelje om verwarring te stichten bij ongewijden, die gaan denken dat al deze talen min of meer in gebruik zijn. Waar zij één oplossing voorzagen, wordt hun plots het bestaan van een massa onthuld. En gezien meer dan een oplossing hier gelijk staat met geen oplossing...

ESPERANTO

is niet plotseling komen opdrukken als een «deux ex machina». Er zijn heel wat ontwerpen aan voorafgegaan. En nog meer zagen het licht na Esperanto. Begrijpelijk: het is voor linguïsten een zeer verleidelijke hobby-varianten te construeren van Zamenhof's geniale schepping. Maar Amerika wordt niet voor de tweede maal ontdekt!

THEORIE EN PRACTIJK.

Heeft U reeds een Novialist ontmoet? Nal Bino horen spreken? Basic English in de radio gehoord? Een krant in Bopal gezien? Een boek in Langue Bleue? Van Panslav gehoord? Neen? Hoe dat komt? Omdat deze talen niet in gebruik zijn.

Maar zelfs Prof. Hellinga heeft reeds met Esperantisten te maken gehad. Hij heeft reeds Esperanto horen spreken. Hij heeft het ook in de radio gehoord. Hij heeft reeds kranten en boeken in Esperanto gezien. Net als iedereen. Hoe dat komt? Omdat Esperanto wel in gebruik is.

De vijfhonderd en zoveel geregistreerde kunsttalen, waarop Prof. Hellinga kan beroep doen om de monolingvisten de schuld van een nieuwe Babel aan te wijzen, hebben, Esperanto uitgezonderd, geen practisch bestaan.

De stelling van Prof. Hellinga is dus zuiver theoretisch, maar niet als zodanig voorgesteld, ook misleidend voor onbedachtzame lezers!

Por nia medito

LA DEVOJ DE NIA VERKISTARO

Ni atente ilin esploru kaj konsideru! Antaŭ ol samideano ion skribas, li funde kaj profunde studu nian lingvon. Ĉu private aŭ per instruado li lernis nian lingvon, ĉiukaze li dediĉu multe da tempo al la perfektigado de sia koro. Ne facilanime li entreprenu verkadon. Se li atente legis la Fundamenton kaj la Krestomation, li ja konas la vortojn de nia Majstro: «Precipe atentan kaj kelkfojan tralegon de tiu ĉi libro (la Krestomatio) mi rekomendas al tiuj, kiuj deziras eldoni verkojn en Esperanto, ne koniginte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon».

Jaroj pasis de kiam la Majstro tion skribis. Li mem kaj multaj aŭtoroj aperigis bonegajn verkojn; estas nia sankta devo, ke ni ĉion legu, studadu kaj komparu. Per tio la stilo fariĝos klara, karakteriza kaj universala. La verkisto evitu la tenton nur legi la verkojn de samlandanoj, li alkitimiĝu al la legado de fremdlandaj verkoj, ĉar la stilo devas esti internacia.

El «Das Esperanto ein Kulturfaktor»

Internacia instruista kunlaborado

La milito frakasis la bone laborantan geinstruistan asocion TAGE kaj malebligis la eldonadon de Internacia Pedagogia Revuo. Tuj post la fino de la milito la bezono de kunlaborado inter esperantistaj geinstruistoj en ĉiuj landoj ekaperis. Depost duonjaro reprezentantoj de la geinstruistaj esperanto-organizaĵoj en Anglujo, Francujo, Nederlando kaj Svedujo diskutis pri la eblecoj de efika internacia kunlaborado.

La rezultato de tiuj intertraktadoj estas decido pri provizora internacia kunlaborado, baze de la landaj nun ekzistantaj geinstruistaj esperanto-organizaĵoj. Komitato estas starigita. Al tiu apartenas f. i. V. C. Nixon, Anglujo, f. i. Jeanne Dedieu, Francujo, s. r. P. Korte, Nederlando kaj s. r. Einar Dahl, Svedujo. Ili funkcias kiel deligitoj de siaj landaj asocioj.

La komitato havas la nomon INTERNACIA INSTRUISTA KUNLABORADO /IK/. La komitato havos CENTRAN INFORMEJON. Instruisto Einar Dahl gvidos ĝin. La adreso estas Centra informejo, s. r. Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo.

Tiu Centra Informejo kolektos informojn el ĉiuj landoj pri instruistaj, pedagogiaj kaj lernejoj aferoj, rilatantaj al esperanto. La Centro distribuos taŭgajn sciigojn al la gazetaro, al la landaj instruistaj organizaĵoj ktp. kaj respondos je demandoj, kiuj temas pri esperanto kaj lernejo. Bonvolu sendi respondkuponon, kiam vi petas informon.

Nia espero estas, ke ni baldaŭ povu saluti novajn landajn geinstruistajn societojn bonvenaj por kune kun la kvar fonditaj labori sur la internacia lerneja kampo.

En landoj, kie la geinstruistoj ne ankoraŭ estas fondintaj specialan fakorganizaĵon, la komitato serĉos reprezentantojn. Jam ni havas nomojn de profesiaj geinstruistoj el diversaj kategorioj, kiuj deklaris sin pretaj esti niaj kontaktiloj. Post nelonga tempo ni publikigos tiun reprezentantaron, sed ni petas, ke geinstruistoj, kiuj emas kunlabori, sendu nomojn, adresojn kaj aliajn informojn al s. r. Dahl kiel eble plej baldaŭ.

La ĉi supre menciita komitato ankaŭ ekzamenis la eblecojn eldoni bultenon. La traktadoj donis esperige bonan rezultaton. Guste pro tiu afero estas necese, ke ni ricevu kiel eble plej multe da adresoj.

Ni esperas, ke niaj ĝisnunaj klopodoj helpu nin atingi la celon: baldaŭa starigo de internacia geinstruista organizaĵo. Sed antaŭ ol niaj esperoj kaj aspiroj estos realigitaj estas necese, ke la geinstruistoj ĉiulandaj energie, fervore kaj celkonscie faras ĉion por subteni nian provizoran planon.

Centra informejo:
Einar Dahl

LA STUDANTO

DE TELWOORDEN (IX)

PO (Slot).

Na onderzoek van PO, thans een middelje om met zekerheid het juiste gebruik er van na te gaan.

Men make eerst uit of het *po-complex* voorkomt als *po-prepozitivo* of als *po-esprimo*, waarna de ontleding plaats grijpt.

1) een *po-prepozitivo* herkent men gemakkelijk: het duidt enkel de wijze van verdeling aan en speelt geen andere rol in de zin; het is adjekto of suplemento en zijn substantief heeft nooit een *-n*. Men vangt *po* dan door: *en egalaj partoj konsistantaj el...* of *konsistantaj egale el...* of *havantaj egale valoron, prezon de...*; men plaatst het *po* substantief er achter en, gebeurlijk, het zinsvoorwerp, voorafgegaan door *da*: geeft deze ontleding een bruikbare betekenis, dan is *po* correct aangewend, anders niet, b.v. *aĉeti vinon po dek boteloj = en egalaj partoj konsistantaj el 10 boteloj da vino*: bruikbaar, dus correct; maar *40 kilometrojn po tago = en egalaj partoj konsistantaj el tago da kilometroj*: absurd, dus verkeerd!

2) Een *po-esprimo* ontdekt men licht omdat, buiten de verdelende betekenis, het nog een andere functie in de zin vervult: onderwerp, voorwerp, adjekt met een betekenis, enkel door bijzondere voorzetsels uitgedrukt (*al, de, en, ktp.*); *po* ontpopt zich dan als pseudo-bijwoord en zijn substantief wordt eventueel aangewend met *-n* of met een voorzetsel. De ontleding: Men plaatst *po* met het telwoord achter het voorwerp, herhaalt het zelfstandig naamwoord in de eerste naamval, vormt dus een onafhankelijk *po-prepozitivo*: *doni po tri pomojn = doni pomojn po tri pomoj* en mem controleert het, volgens de methode reeds vroeger omlind bij de eenvoudige verdeling (zie bijdrage VII, A, 1°).

Slot

Wij beschikken niet over plaatsruimte om zekere details, die ons minder gerechtvaardigd voorkomen, aan te vermelden, doch men onthoude dat de behandeling PO, zoals zij door Kalocsay en Waringhien geschiedt, zo systematisch en logisch opgebouwd werd, dat het geheel in globo mag aanvaard worden.

Men kan opwerpen dat de uiteenzetting vrij ingewikkeld aandoet: men kan zich ongetwijfeld altijd aan onvolledige en elementaire richtlijnen houden! Is het, voor gevorderden, dan niet zaak in staat te zijn een oplossing te vinden voor alle gevallen, en biedt de opvatting en voorstelling van de twee gekende vakkundigen hen dat niet? Is ons opzet dan niet de talloze fouten in het gebruik van PO, te voorkomen, fouten aan de simplistische regels, geformuleerd in de meeste spraakkunsten, te wijten?

Wij hopen derhalve dat wij onze «Studentoj», door de beproefde behandeling, enige hulp hebben verstrekt en sluiten onze reeks bijdragen door een aanduiding der bronnen.

Bronnen:

L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, Lingvaj Respondoj; K. Kalocsay en E. Waringhien: Plena Gramatiko de Esperanto (pag. 207-219); F. Faulhaber: Tra la Labirinto (pag. 207-224); P. Fruictier-S. Grenkamp: Komplete Gramatiko (pag. 31-33, 144-145, 161); L. Kitzler: Internacia Gramatiko de Esperanto (pag. 36, 80-86).

T.v.G.

Oefening 24.

Hieronder, ter vertaling in 't Esperanto (A) en in 't Nederlands (B), gemakkelijke opgaven. In ons volgend nummer publiceren wij een modelvertaling, met aanduiding van eventuele varianten en aantekeningen, naargelang zij uit de ingezonden teksten wenselijk blijken.

De oefeningen worden talrijk ingewacht langs de redactie om, aan het adres Postbus 342, Brussel.

Let wel! Wie zijn verbeterd werk terug verlangt, verzuime niet een zegel voor antwoord in te sluiten.

Komaan, de gelegenheid te baat genomen! Aan 't werk!

A) *Geschiedenis*:

De moderne mens, en voorzeker de moderne historicus, twijfelt er in 't algemeen niet aan: de geschiedenis is een wetenschap. Talrijke artikelen en lijvige boekdelen, werden door allerlei deskundigen uitgegeven, om deze stelling te grondvesten. Hevige polemieken werden gevoerd, om er de betekenis nader van te bepalen. Wis- en natuurkundigen, doctors in de medicijnen en andere voorstanders van het positief-exacte kan men over 't algemeen niet overreden: ook bij de meest drastische argumenten weigeren ze zich neer te leggen (Uit «Geschiedenis van Dr. E. Lousse, blz. 14»)

B) *Lingvo internacia*:

La bezono de unu internacia lingvo aŭ kelkaj koncernas rekte aŭ nerekte ĉiun, ne sole la diplomaton kaj la astronomon, sed ankaŭ la kampulvidviron kiu, dum sia tuta longa vivo, eĉ ne vizitis iun el la najbaraj vilaĝoj. Devas ekzisti dulingvaj aŭ plurlingvaj homoj, kiuj peradas la intersangon de pensoj inter la popoloj; kaj ege gravas ne nur por la spirita progresado, sed en same alta grado por la vivtenado de la popoloj ke la problemo de internacia lingvo estos solvita en efika kaj fortspara maniero. (El «La problemo de Lingvo internacia» de Dro Björn Collinder, p.17.)

Verbetering Oefening 23

A) *La Reĝo kaj la Forĝisto*

Reĝo ordonis ke neniu laboru dum lia naskiĝtago kaj forĝisto malgraŭe riskis, en ĉi tiu tago, uzi la martelon kvazaŭ ne ekzistus reĝo.

Tio estas rakontita al la reĝo kaj li ordonas, ke oni konduku la forĝiston antaŭ lin. Ĉi tiu venas kaj konfesas, ke li forĝis dum lia naskiĝtago.

Kaj la reĝo demandas: «Kial vi spitis miajn ordonojn? Kiu devigis vin fari tion?»

«Iu, pli potenca ol vi, ho reĝo», estas la respondo.

«Kiu do?» demandas la reĝo.

B) *De Koning en de Smid*

«Mijn plicht, Sire. Ik moet werken, óf met mijn gezin honger lijden. Want alle dagen moet ik acht zilverpenningen verdienen. Twee, die ik moet uitleenen; twee die ik vroeger geleend heb, en vier, die mijn vrouw en ik nodig hebben. Ik heb jonge kinderen: hun leen ik iederen dag twee penningen, die zij mij zullen terugbetalen, wanneer ik oud en zwak ben; twee penningen betaal ik dagelijks aan mijn oude vader, die ze mij vroeger geleend heeft, toen ik nog een kind was; vier penningen hebben mijn vrouw en kinderen dagelijks nodig om te leven. Als gij mij nu eiken dag acht penningen wilt geven, o koning, dan zal ik uw geboortedag mijn hele leven vieren!»

De koning lachte hartelijk en beloonde de smid voor de dankbaarheid jegens zijn vader en voor zijn zorg voor vrouw en kinderen. (Uit «Esperanto Leer- en Leesboek» door W. W. Van Alphen, blz. 119.)

La Redakcio respondas:

Pri la marta ekzerco, n° 22:

La alta nivelo de ĉiuj ensendoj estis tre gojiga; nur koncerne la esperantigon, rimarkigoj necesas; la nederlandigo estas kvazaŭ perfekta en ĉiuj taskoj. Ni notis:

eenzaam en treurig zat ik...: oni uzu «sola kaj malgaja» kaj ne la adverban formon: temas ja pri la stato de la subjekto dum la ago «sidi», kaj neniel pri la maniero de tiu ĉi ago (ne adverbo, sed adjektiva adverba komplemento: bepaling van gesteldheid).

verdrietig: oni preskaŭ ne uzis «ĉagrena», kvankam la senco «malgajiga, aflikta, morale doloriga» nepre taŭgis.

wetboeken: «leĝlibro» konvenas; *ko-do* estas tamen la teĥnika termino.

doerbladeren: multaj skribis: «trafoliumi»; «tra-» superfluas kaj konsidere al la principo de neceso kaj sufiĉo «folii» ne bezonas kroman umsitikon. *drukkende* warmte: kelkaj uzis «sufokiga»; kvankam iom drasta la vorto estas akceptebla, sed sen-ig-, do: sufoka.

phantastische vormen: «fantaziaj»; ne: «fantomaj» (spookachtig).

donkere kleuren: oni preferu «malhelaj» (anst. mallumaj); «hela» estas ja koloro pli proksima al blanko ol la nigro, —ĉi tio estas evidente la ĝusta nuanco en la dirita kazo.

T.B., Laak Houthalen, R.D.S. kaj L.V. D.P., Gent, S.P. Blankenberge, J.S. Hasse, A.L. Antwerpen, Verda: via teksto estis resendita kun personaj notoj.

FERIOJ

Mi staris sur alta duno...
Mi fuĝis la betonon, la frostan, mal-
molan betonon, kiu karcere ĉirkaŭis min
dum plena jaro, la fuŝan, rigidan beto-
non kun ĝiaj nulaj horizontoj. Mi aliris
marobordon : suno estos tie, hela, peto-
la suno, kaj sablo, flava, varma sablo,
kaj muziko : la ŝaumondado de l' eterna
akvomovo, la susuroj de l' klinanta
junko !

Sed hontis la suno, malsekis la sablo
kaj muĝis akvo, supertondante mian
adan sopiron. Trude regis gasto, kiun
inivitis neniŭ, vento, vento, la vento, kiu
pelis sablon en la okulojn, agitis la ma-
ron, sternis la junkon, ŝiris la nubojn
kaj stompis la horizontojn.

Kiel do migri for, serĉante novajn
ĝuon kaj feliĉon, kaj tiel elreviĝi ? An-
kaŭ tie, ho ye ! mi renkontis betonon :
enterajn masojn, kie apenaŭ mutiĝis la
murdloj, kaj memorajojn pri milito,
sanga frenezo, bombarado (aŭdu la miron
eksplozi !), urĝe flikitaj ruboj, stumpe
konturantaj la proksimon.

Mi staris sur alta duno, kiam mi aper-
tis ĉion ĉi, alta duno flanke de la stran-
do, kaj tenis mian dujaran knabeton
sur brako : ĉion ĉi mi montris kaj eks-
plikis sed li vidis nek komprenis ĝin !
Kaj fakte, mi tiam ekpensis, estas li
mia feliĉo, lia ĝojo mia ĝojo, lia rido
mia rido kaj lia fila fida kiso la varmo
de mia koro ! Ha ! li longe vivu, longe
vivu, pace vivu !

Ho Paco ! nuna, ĵusa paco... Rezistu
kaj restu, mi petegas : milionoj kaj mili-
onoj da filoj, da patroj jam pereis por
vi, la homoj pretas rezigni siajn ĝanga-
lajn leĝojn, komprenas ke ankaŭ la
« alia » estas homo, nura homo...

Mi staris sur alta duno kaj tremis,
esprimante mian vanan esperon : mi sen-
tis min malfortulo kun infaneto kaj sciis
ke mi naskiĝis en unua milito, travivis
duan, ja mortos en tria...

Ĝi estis alta duno, ie ĉe la marobordo...
Dirk

Esperanto semajno en Angers

13-22 Julio 1947

S. Pragano skribis en « Heroldo » :
« Nia rolo estas malfermi la okulojn
de la dormantoj kaj montri la veron ke
nia solvo ne estas projekto surpapera
sed vivante lingvo, uzata ĉiutage kaj
uzebila sur ĉiu kampo de la homa akti-
veco ! »

Precize tio estas nia celo. Kaj precize
tial ni organizas nian Esperantistan Se-
majnon. La prezoj de la restado estas
malaltaj : 150 fr. fr. potage (en komuna
dormejo) aŭ 200 fr. fr. se oni deziras
apartan ĉambiron. Bona nutrado. Aligo
nur 100 fr. fr.

Okazos : paroladoj, filmmontrado, vi-
zitoj de vidindaĵoj, muzeoj, fabrikoj,
ekskursoj tra la vinberoj kaj al la
marbordo.

Partoprenantoj al la Universala Kon-
greso povas resti en Angers ĝis forve-
turo al Berno. Ni jam ricevis aliĝojn
de Britujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Hun-
garujo, Maroko, Nederlando. Petu infor-
mojn de F. Ino Nouais, 28 B-d Descaze-
aux, Angers, Francujo.

Somera lernejo en Doksy

19-Julio ĝis 2-Aŭgusto 1947

Jam duafoje post la milito ni aran-
gas en Doksy ĉe Machalago en ĉarma
Bohemujo someran lernejon kaj semina-
rion. Ĉiusepacaj amuzarangoj : muzik-
vespero, dancoj, somera karnavalo, eks-
kursoj, sporto, banado, bivaka fajro.
Eksterlandaj gastoj rajtas partopreni
senkoste ! Petu informojn de V. Spur,
Doksy, ĉe Machalago, Bohemujo, Ĉeĥo-
slovakio.

Someraj Kursoj en Danlando.

Fidelaj al niaj Esp-tradicioj ni okazi-
gos ankaŭ ĉi-jare somerajn kursojn.

17. — 24. de julio, ili okazos en la in-
ternacia altlernejo en Helsingor. 27/7 —
2/8 ili okazos en la altlernejo de Had-
sten, tuj apud Aarhus, kie la SAT-kon-
greso estos de 2/8 — 7/8.

En la pasinta somero partoprenis pres-
kaŭ 200 personoj el 8 landoj, kaj ni raj-
tas kredi, ke ĉi-jare venos kursanoj el
pli da landoj.

La manĝaĵo estas bonega kaj abunda
en nia lando — kaj la humoro de la da-
naj E-listoj estas brila. Tial ni kore invi-
tas vin.

Petu prospekton pri la kursoj
de S-ro L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

ESPERANTO-DICHTERS

in vertaling

De wisseling van de seizoenen was steeds het internationale thema bij uitstek voor alle dichters. De Rus *Vasilij Devjatnin* (geb. 1862 en Esperantist sinds 1892) was een der eersten om in de nog jonge taal zijn gevoelens over de Lente te verwoorden. Dr. Zamenhof, met wien hij bevriend was, nam zijn vers « *Printempo* » op in de « *Fundamenta Krestomatio* » (1903) die o.a. een overdruk bood van 70 voor het meerendeel in het eerste tijdschrift « *La Esperantisto* » (1889-1895) verschenen gedichten.

LENTE

De Lente komt en leven biedt
Ze aan alles nu, die mooie vrouw :
De warme zon haar stralen schiet,
De morgen glimlacht door den dauw
Op 't lief gelaat, nog jong beschroomd,
En van den berg, de beek bezielt
Nu bruisend naar beneden stroomt,
En alle bruggen zijn vernield...

Ja, alles nu opnieuw herleeft
En zingt de komst der nieuwe Lent'...
Maar in mij is 't de kou die beeft,
Het gure weër nam nog geen end'.
Waar alles zonnig, wonnig is,
Daar kwam voor mij de Lente niet,
Maar liet zij enkel duisternis,
De duisternis en het verdriet !...

Uit « *Verkaro* » I. (1905)
H. Vermuyten.



SENHALTE AL LA CELO! *Facila legolibreto originale verkita de A. Norbert. Eldonis : Tramondo, Vieno 1946. 52 p. Prezo nemontrita.*

Simpla eksterajo, klara preso, riĉa vortrezoro. La unua parto estas vera vortareto : abundas nomoj de medioj, landoj, floroj, fruktoj, arboj, bestoj, objektoj, ktp. La ceteraj partoj pritraktas malsatindajn homajn tipojn, instigojn al la bono, al Esperanto aŭ enhavas spritaĵojn, fabletojn, ktp. Preskaŭ ĉiun legajon finas versajo kaj la lasta parto konsistas nur el poeziaĵoj, kiuj bedaŭrinde ne estas sufiĉe fluaĵ nek beletraĵ.

La proza parto nepre pli valoras : stilo simpla, frazoj bone konstruitaj kaj fluaĵ. Gramatikaj eraroj maloftas. Tamen : la januaro, la ŝato havas po du hufojn, en la drogejo oni aĉetas bandag(ŭ)ojn. Ortografiaj eraroj : vipero (vipuro), sardeloj kaj sardenoj (anst. sardinaj), la subularo estas pieb(ej)a fiularo.

Misuzitaj vortoj kaj esprimoj i.a. : absorbi kurson (sekvi), la lignajsto faras la meblojn (la meblisto), bedaŭrinda besto (kompatinda). Ne svarmas la preseraroj. La aŭtoro uzas io por landnomoj.

Ne ĉiam li sukcesis malkovri la ekzaktan terminon : ne *Aŭstralio* estas la kvina kontinento, *saluto* ne estas kreskanta legomo (laktuko), *angvino* ne estas serpento kaj *omaro* ne estas fiŝo, ktp. Sur p. 11 ni trovis : Cu vi konas *brutojn* kiuj estas *birdoj* ? Jes, la, *koken* kiu donas la *avojn* (1).

Malgraŭ tiuj malperfektaĵoj kaj eraroj ni emas rekomendi la libreton kiel studo-lego-libron por progresaj kursoj kaj por unuopaj, studemaj, esploremaj esperantistoj. La tria parto malkaŝas ke la aŭtoro estas adepto de la Interna Ideo kaj ke li klare kaj ĝuste pensas kaj rezonas.

Verda.

KVARA RAPSDIO de F. Szilagy. *Eldonis : ELDONA SOCIETO ESPERANTO, Stockholm. 48-paĝa. Mendeblo ĉe F.E.I. — Prezo broŝ. 28 Fr.*

Ne multpaĝa sed multsaĝa popularin strua kaj beletristika daŭrigo de serio, kies 2-an kaj 3-an numerojn ni en la pasinta jaro jam favore recenzis.

Tiu ĉi denove plaĉas pro bonstilaj tekstoj de Szilagy, Engholm Waringhien, Dresen. Krome el la enhavo : « Problemoj ĉe tradukado » (Gerda) « Hendrik Adamson » (Rec.) ; raciaj versoj de Kalocsay pri « la interna ideo » kaj varmaj de Baghy, kies « Frato, vekigu » eksonas konate ; rimarkindaj « Nova Sento » de Zehariev kaj « Nordo » de Totsche kun nur ses neologismoj ; la finno Setälä interesas per klarigo de l' sentenco « la maŭro faris sian devon, la maŭro povas foriri », sin apogante sur la ŝekspire tradukon de ...Burgersdijk.

La diverseco de la temoj postulis vastan uzon de vortoj, inter kiuj la suspektaj : boŝanco (?), ilo, ŝio kaj kamufliĝi. Bona papero kaj preso, sed bedaŭrinde enestas pli da eraroj ol kutime.

TYN.

« **BHAGAVAD - GITA** » t.e. « *Sublima kanto pri la senmorteco* » -95 p. El la sanskrita originalo verse tradukis : Francisko Valdomiro Lorenz. Eld. : Livraria da federacao E. Brasileira 1942. Rio de Janeiro — Brazilo. Mendeblo ĉe F.E.I. Prezo : 36 bfr. Bind.

Grandan dankon ni ŝuldas al F.V. Lorenz pro tiu valora laboro. Ni, depost nun, ne nur fiere montras la tutan Biblion en E., sed ankaŭ unu el la sanktaj libroj de la Hinda popolo. Ĝi estas verko kiu ekestis 1500 j. antaŭ Kristo ! Ni ĉiuj konas iomete, tre supraĵe, tiun misteroplenan popolon. Ni ion scias pri la multaj tieaj dioj ; pri la majestaj, belegaj temploj ; pri la strangaj ritoj, popolkulturoj. Ni jam aŭdis nomojn kiel « Nirvana », sen ke ni tute ĝuste scias kion ĝi signifas. Nu, por kompreni ĉion tion, oni devas legi tiujn librojn kiuj fundamentas tiun popolon ; same kiel oni devas legi la Biblion por kompreni Kristanisman. Jam ekzistas tiu ebleco por amenaŭ unu de la Hindaj libroj ; kaj ĝi klarigas tre, tre multe. Estas evidente ke ĝi ne interesos la grandan publikon. Oni devas emi al tiuj temoj. Sed multaj partoj vere kaptas la atenton kaj oni ne scias kion plej admiri : ĉu la oftajn majstrajn psikologiajn priskribojn, ĉu la prunde saĝajn eldironojn, ĉu la interesajn konceptojn. Ni tuj diru ke la trakudo estas bone farita. Ĉiujn laŭdojn meritas nia kompetenta S-ano F. V. Lorenz.

Kelkaj lingvaj rimarkigoj : Estas ne permesata kunligi adjektivojn kaj substantivojn. Do la vortoj « *bravherooj* » kaj « *blankcevaloj* » (p. 12) estas ne ĝustaj. Se oni tamen faras, oni ne plu indikas kvaliton de la substantivo, sed jes specon.

Ni notis nur du preserarojn : frutoj, anstataŭ fruktoj (p. 21-verso 51) kaj sentofaro, anstataŭ pentofaro (p. 82-verso 16).

La tradukinto uzas la Ido-sufikson « *oz* » : respektoze (p. 63-verso 35) kaj ŝtormoza (p. 67-verso 7).

F.R.

PREMIAJ ROMANETOJ de KONKURSINTOJ. *Eldonis : The Esperanto Publishing Co. Ltd. Rickmansworth, 1947. 95 p. Mendeblo ĉe F. E. I., prezo : 26 bfr.*

Okaze de literatura konkurso, E. P. C. ricevis grandan kvanton da noveletoj ; jen kolekto de tiuj kiujn premiis la ĵurintaro. La verketo estas precipe ŝatinda, ĉar ĝi rebriligas la nacian menson ; ne nur la speco mem (la *short story* en kiu eminentiĝas la anglaj), sed ankaŭ ofte la temoj pritraktitaj (ĉu nur hazardo de la libro komencigas kaj finiĝas per fantomrakonto ?) estas tipe anglaj. La temoj ne estas tiom diferencaj kiel la stilo ; kelkaj verkintoj uzas serenajn frazojn, aliaj mirigas la leganton per strangaj metaforoj, iuj sisteme ellasas la demandan vorton « *ĉu* », aliaj regule nomas beston per pronomo « *li* » aŭ « *ŝi* », eĉ kiam tute ne necesas indiki ĝian sekson. Ni notis uzon de la vorto « *eskapi* » (p. 50), kiun kreis Teo Jung, kaj dufojan uzon de « *kamErado* » ansta-

Schoon Lier

(Bela Liero !)

La historia Lier estis fondita en la 8-a, kaj jam en la 12-a jarcento ĝi fariĝis urbeto ; ĝi nombras ĉ. 25.000 loĝantojn.

Inter la plej interesaj konstruaĵoj, ni notu unue la gotikan preĝejon de Sta Gumaro (15-a j.c.), unu el la plej karakterizaj nederlandaj preĝejoj. Ĝi prezentas vitrajn fenestrojn, pentraĵojn kaj skulptaĵojn de l' plej famaj flandraj artistoj. La sorĉa ĥorejo el blanka grejso estas ja la plej fea punkto en la antikva punturbeto.

Depost la 12-a j.c. oni konservas en ĝi la relikvojn de la urba patrono, S.ta Gumaro, kiujn ĉiujare oni dufoje portas procesie tra la urbo. El la pentrinda svelta turo muzikas belsona sonorilaro de 47 elementoj kaj la preĝeja muzeo estas plena de artaj objektoj el oro, argento kaj stano, antikvaj punktoj kaj belega kopio de la Svittuko de Torino, kiun A. Dürer pentris en 1516.

La S.ta Petro-kapelo, la vera origino de la urbo, estas unika ekzemplero de romana arkitekturo.

De la Granda Placo, kun ĝiaj plaĉaj gildodomoj, oni admiras la gotikan beifridon kaj la renesancan urbodomon.

La antikva beginejo, unu el la plej ĉarmaj de Flandrujo, estas kiel miniatu-
ra urbeto kun propra riĉa preĝejo kaj aroj da tipaj, pentrindaj dometoj, gardenoj kaj anguloj. Vera perlo de la « *Pallierlando* », tiel majstre priskribita de l' fama Flandra romanverkisto, F. Timmermans.

Dum la lastaj jaroj Lier logas la turistojn per nova mirindaĵo, la « *Zimmermuro* », kie la meĥanikisto ZIMMER muntis veran astronomian unikajon ; astronomoj asertas ke ĝi estas ne nur meĥanika fabelaĵo, sed ĉefe ideala bildo pri la konstruo de l' universo.

La Muzeo Wuyts-Van Campenhout-Caroly enhavas interesan kolekton da pentraĵoj de Lieraj artistoj i.a. Opsomer kaj De La Haye kaj de la mondfamaj majstroj Rubens, Van Dyck, Teniers, De Braekeleer, Breughel II, Frans Floris k.a.

La trian kongrestagon, la Flandraj Esperantistoj kaj iliaj gastoj vizitos « *Schoon Lier* », naskiĝurbon de plejado da artistoj, inter kiuj ni citu : Felix Timmermans, Zimmer, Opsomer, kaj Van Boeckel.

La lundo neniel estos la malplej interesa tago de nia kongreso !

POL VARENS.

AANDACHT A.U.B.!

Ter voorkoming van vertragingen en mogelijke vergissingen diene dat :

1. Lidgelden (ook abonnementsgelden) betaald worden op postrekening 2321.50 van de *Vlaamse Esperantisten-Bond*, Brussel.

2. Correspondentie voor het Bondssekretariaat, de Redactie (kopij!) en de Administratie (adreswijzigingen, advertenties!) van « *Flandra Esperantisto* » gezonden worden aan de *Vlaamse Esperantisten-Bond* (V.E.B.), Postbus 342, Brussel.

3. Betalingen voor boeken e.d. geschieden op posrekening 3268.51. van het *Vlaams Esperanto-Instituut*, Brussel.

4. Bestellingen voor boeken e.d. gezonden worden aan het *Vlaams Esperanto-Instituut* (V.E.I.), P. van Humbeekstr. 3, Brussel-West.

Noteer : twee postrekeningen, twee adressen !

taŭ « *kamArado* ». Enestas kelkaj preseraroj, pri kiuj ni volonte silentas, escepte pri « *abomeninda* », kiu en unu rakonto estis dufoje presita malkorekte (abominanda, abominanda). Ni tre multe ĝuis la rakontojn, precipe la du lastajn ; la propagandaj noveletoj ne estas la plej bonaj ; tion kaŭzis nesufiĉa diskreteco.

F.P.

KATALOGO DE OFICIALAJ POSTAĴOJ KUN ESPERANTA TEKSTO (kovertoj, kartoj, markoj) de G. Saget. 16-paĝa ilustrita eldonaĵo de ILEPT. Mendeblo ĉe F.E.I. Prezo : 7,50 bfr.

Jen bonvena kaj valora eldonaĵo por niaj filatelistoj ! Ĉiuj ni scias ke kelkaj landoj eldonis p.m., kovertojn, poŝtkartojn kun E-teksto sed malmultaj havas precizan ideon pri la kvanto de tiuj oficialaj eldonaĵoj. Jen ilustrita katalogo pri ili kiu cetere estas bona propagandilo!

E.C.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. Afdeling Antwerpen. — Bestuurslid A. Lodema hield op 21.4 een interessante voordracht over zijn geboortestad Amsterdam. Afwisselend worden conversatie-avonden en lessen voor gevorderden belegd.

V.E.B. Afdeling Brugge. — Met medewerking van « Verda Stelo » werd door onze afdeling een ontspanningsavond ingericht te Assebroek. Bij deze gelegenheid werd er flink propaganda gevoerd onder het talrijke publiek. Onze cursus voor beginners loopt naar zijn einde, zodat we weldra een schare nieuwelingen zullen kunnen begroeten.

V.E.B. Afdeling Brussel. — Op 8 Mei jl. werd alhier een V.E.B.-Afd. opgericht. Bestuursleden zijn: E. Symoens (Voorzitter), R. Cosijn (Onder-Voorz.), A. Sutterman (Sekr.) en T. Janssens (Penningm.). De eerstkomende vergadering gaat door op 29 Mei te 19.30 u. in Vl. Club (Em. Jacquemaillaan 121) Inlichtingen bij de Sekr.: A. Sutterman, Opzichterstr. 87, Molenbeek-Brussel.

V.E.B. Afdeling Gent. — Op 19 April jl. ontving de afdeling het bezoek van leraar Henk Thien uit Winterswijk. Deze gewezen Esperanto-onderwijzer van de Vlaamse Esperantisten-Bond nam de gelegenheid te baat om een korte proefles te geven volgens de gekende Cseh-methode en te spreken over de beweging in Nederland. Het werd een interessante en uiterst gezellige avond.

V.E.B. Afdeling Mechelen. — Hier wordt met man en macht aan ons 12e Kongres gewerkt. De leden zien hun ijver beloond door het aantal reeds ingeschreven deelnemers dat dit van verleden jaar ruim overtreft.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMIO: Post la 22-a enigmo, S-ro A Marmenout el Blankenberge gajnis la premion: « De Paĝo al Paĝo » de L. Totsche. Ni gratulas! Sekvas: Van Mullem, 9 p.; Mooij, 8 p.; De Baets, 7 p.; Deckkers, Laporte, A. Pintelon, Popelier, F. Roose, Verda, 6 p.; De Kersgieter, Haneveir, Maertens, 5 p.; k.t.p.

SOLVO DE LA 23-a ENIGMO.

HORIZONTALA. 1. bot; kom; arĉ. — 2. ran; ind. — 3. tro akr; mez. — 4. Faraono. — 5. kler; onkl. — 6. kresk. — 7. mumi; turk. — 8. Egiptuj. — 9. kod; mor; enu. — 10. abi; ist. — 11. lul; tul; obl.


VERTIKALE. 1. butik; makul. — 2. laŭ. — 3. trofe; medal. — 4. arklg. — 5. knar; imit. — 6. Kabe; po. — 7. miro; tril. — 8. noktu; — 9. admon; ujeto. — 10. ker. — 11. ĉizil; kruel.

N-ro 24: KRUCVORTENIGMO.

HORIZONTALA. 1. esprimi sian simpatian al iu pro ties malfeliĉo (R). — 2. post la sepa; lokindika vorto. — 3. ĝi varmigas (R); vorto uzata kiam oni kalkulas. — 4. prepozicio; furaga aŭ ornama kreskaĵo (R). — 5. vojo (R). — 6. per ĝi oni faras kompton (R). — 7. distingiga signo (R); parto de domo (R). — 8. poseda adjektivo; ne povanta paroli (R). — 9. per ĝi oni alĝustigas kelkajn vestojn (R); prefikso. — 10. pagi por la uzado de io; bretareto (R). — 11. ankaŭ li kuracas (R).

VERTIKALE. 1. Ekzakta reproduktaĵo. — 2. juvelŝtono (R); persona pronomo. — 3. ĝi troviĝas en la buŝo (R). — 4. tro indulgi. — 5. numero; ludkarto (R); fenestro destinita por interparoli (R). — 6. lumigilo (R); trinkaĵo (R). — 7. amaso (R). — 8. absolute necesa (R); esti neprokrastebla. — 9. dorneca planto (R); prepozicio. — 10. nedifina adjektivo; prefikso; difinita epoko (R). — 11. politika reĝimo (R).

La solvon oni sendu sur aparta folio al POSTBUS 342, Brussel, antaŭ la 1-a de junio.



Flandra Esperanto-Instituto
V.z.W.
P. v. Humbeekstraat 3,
Brussel-West
(Postrekening: 3268.51)

In andere talen moet U lezen:
E. D. Durrant: THE LANGUAGE PROBLEM (Its History and Solution) 168 p. Geb. fr. 50
Dr. J. Kreutzer: ESPERANTO EIN KULTURGUT? (Sein Wesen und Wert im Feuer der Kritik) 112 paginas. Ingen. fr. 16
J. Couteaux: PLAIDOYER POUR L'ESPERANTO (met vertaling in het Esperanto) 96 p. Ingen. fr. 25
Prof. G. Waringhien: A. B. C. DE L'ESPERANTO (à l'usage de ceux qui aiment les lettres) 72 p. Ingen. fr. 20
L. Perret: RECEUIL D'OPINIONS ET VOEUX (de savants, d'écrivains et de hautes personnalités et de hautes assemblées) Geïllustreerd fr. 18
OVER KORT VERSCHIJNT de derde uitgaaf van « Plena Vortaro » vermoedelijke prijs 190 fr. geb.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr.
Enpresigo kostas minimume 15 bfr.
Unu int. respondkuponon valoras 3 bfr.

S RO G. SAGET, 8 rue Guérot, EL-BEUF (Seine Inf.), Francujo, respondos, uzante belajn bonfarajn poŝtmarkojn de Francujo, ĉiun, kiu sendos al li iun ajn karton aŭ koverton, kiu surhavas la specialan Esperanto-poŝtstampon de la XII-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista.

S RO DITTA MARTINI en Firenze, Italujo, Via Aleardi 38, organizos dum la kuranta jaro en sia urbo pri la esperanta progreso grandan ekspozicion kaj kolektas ĉiujn necesajn dokumentojn, precipe filatelajn kaj libroeldonaĵn. Interesatoj ŝribu!

OTTO ROGALL, Selm-Belfang (21), Prov. Westfalen, Britische Zone Deutschland, deziras korespondi kun Flandraj geesperantistoj.

DEZIRAS KORESPONDI kun ĉiuj landoj: S-ino Martta Björk, Iisvesi, Finnlando. Certe respondas!

PERLOJN el prelegoj kaj leteroj de nia Majstro vi trovas en « Pensoj le Zamenhof », kolekto de homaranaj pensoj. Dukolora preso, kvarlingva enhavo: prezo: 12 fr. Mendu ĉe via libro-servo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

International Tramping Tours

Libervola neprofitcela movado kiu laboras por Paco. Organizas internaciajn feriojn por unu aŭ du libertempaj semajnoj je plej malmultekostaj kondiĉoj.

Feriaj Restadoj en Anglujo kaj Svislando. Feriaj Kursoj en Francujo kaj Irlando.

Karavanoj de piedirantoj al: Belĵujo, Danujo, Francujo, Irlando kaj Nederlando. Petu informojn: A. & M. Willems « La Brise », Zeelaan Bredene a/Zee (Belg.)

Hon. Secretary I.F.I. 6, Bainbrigge Road, Leeds 6, Anglujo.

ĈAPITRO 23-a

Kant vidis Steinmann mem sidi malantaŭ ŝi sur la lito. Kiel lia edzino li estis ankoraŭ vestita. Li sidis, la kapon inter la manoj, kvazaŭ la zorgoj de la tuta mondo ŝargus nur liajn ŝultrojn.

« Nu! Kion signifas? » La kraka voĉo estis eĉ pli morda.

« Pardonu, sinjorino, vi ne enlitiĝis! »

« Tio ne koncernas vin. Vi ofendas! »

« Sed mensogas ne mi, sinjorino Steinmann. Lasu min preterpasi! »

« Neniu piedon vi metos tien ĉi, komprene, sinjoro? »

Kant agis, kvazaŭ ne aŭdinte ŝin, sinjorino Steinmann, mi petas ke vi momenton kuniru al mia kajuto. Mi faros kelkajn demandojn al vi.

La industriisto malrapide levis la kapon kaj senesprime fiksrigardis antaŭ sin. Doktoro Gulopez rimarkis ke li aliĝis. Lia bombasto, lia memfido, lia fiero, ĉio forlasis lin. La korpulenta viro ŝajnis rompita. Li pene ekstaris kaj rezigneme sopiris.

« Restu ĉi tie! Ne kuniru! » Ne estis konsilo, sed dikto.

« Sinjoro Steinmann, mi deziras pride mandati vin ĉe mi », Kant neŝanceble diris plu.

« Vi ne rajtas tiamaniere aresti iun! »

« Sinjorino, mi havas la necesajn prokurojn. »

Doktoro Gulopez momenton opiniis ke la virino jetos sin sur la spuriston. Lasttafoje ŝi streĉis siajn fortojn.

« Edzo, restu. Ne faru kion ili diras. Mi ordonas ke vi restu ĉi tie. Ke ili... » Ŝi ekfrontis kontraŭ sian edzon.

« Venu, sinjoro Steinmann. »

La industriisto cedeme obeis. La sugesto de Kant sendube pli fortis ol la edzino, ŝi iris unu paŝon malantaŭen, ĝuste sufiĉe por tralasi sian edzon. La ŝtalgrizaj okuloj flagris. Kant refoje rigardis ŝin de kapo al piedoj kaj sekve unusvinge fermis la pordon malantaŭ si.

En sia propra kajuto, li invitis Steinmann eksidi. Li mem lokis sin antaŭ lin kaj signis al Doktoro Gulopez ke li notu.

« Sinjoro Steinmann, kie vi estis pasintnakte inter la dudek tria kaj duono kaj noktmezo? »

« Mi jam diris tion », li surde respondis.

« Nu, ripetu. »

« En mia ĉambro. »

« Sola? »

« Ne, kun mia edzino. »

« La tutan vesperon? »

« Jes, ĝis mi enlitiĝis. »

« Kiam vi faris tion? »

« Ĉirkaŭ la duono post noktmezo. »

« Kaj kio okazis al via filo? »

« Li ebria envenis iom post la dudek tria kaj duono. »

« Kiel vi scias tion tiel precize? »

« Mi preparis mian enlitiĝon kaj ĵus rigardis mian horloĝon. »

« Kaj sekve? »

JAĤTO VETURAS EL...

« KRIMINALA ROMANO » Tradukis: Dro T. Ken. Verkis: Deck Dorval.

« Mi admonis mian filon kaj helpis lin en lian ĉambron. »

« Ĉu vi longe restis en ĝi? »

« Ne, eble kvin minutojn. Ne pli longe... »

« Kaj poste? »

« Mi tuj aliris mian kajuton kaj restis ĉe mia edzino kiel mi diris. »

« Ĉu vi vidis Profesoron De Groot? »

« Ne. »

« Ĉu vi scias ke Profesoro De Groot asertas ke, ĉirkaŭ tiu tempo, li estis en la ĉambro de via filo, kun via edzino? »

« Jes, mia edzino diris ion tian al mi. »

« Kaj? »

« Maleble veras. »

« Kiam vi revenis en vian ĉambron? »

« Mi ne ĝuste scias. Ĉirkaŭ la dudek tria kaj duono. »

« Pli frue aŭ poste? »

« Ne poste. Ne... »

Kant saltrekligis. « Vi mensogas, sinjoro Steinmann! »

« Mi... Kiam mi... »

« Oni vidis vin je la dudek tria kaj kvindek kvin. »

« Ekskludite... »

« Sinjoro Steinmann », Kant tondris, « lasttafoje mi avertas vin. Mi ne venis ĉi tien por ke mi aŭskultu fabelojn sed la nudan realan veron. Ĉiu plia mensogo eble havos fatalajn sekvojn por vi. »

La industriisto silentis.

« Diros mi al vi », Kant kriegis, « kiel ĉio okazis. Aŭskultu, sinjoro Steinmann! Ĉirkaŭ la duono antaŭ noktmezo, via ebria filo tumultis en la koridoro. Akompanis lin Profesor De Groot kaj via edzino, kiuj kondukis lin en lian ĉambron. Poste ili reiris, ĉiu al la propra ejo. Sed vi ne estis, sinjoro Steinmann, nek en la ejo de via filo, nek en via propra kajuto. Vi estis aliloke! »

« Sed... sed... »

« Neniel: sed...! vi revenis en vian ĉambron je la dudek tria kaj kvindek kvin. Ĉesu mensogi, ĉar mi mem vidis vin eniri! »

Kant konsciis ke li nun ludas riskan, altan atuton. Li tamen sentis sin nepre firma. Almenaŭ io klariĝu. Esperplena, li fiksrigardis al Steinmann, kiu sidis, fakte kaŭris antaŭ li, kun la dika mentono sur la masiva brusto.

Tiam, en la morta silento, kiu pendis en la ejo depost la eksplodo de Kant, li hezite flustris:

« Jes... Mi ne estis en mia ĉambro, mi estis... Ĉion mi konfesos. Mi diros la veron. Hieraŭvespere sinjoro Maxton invitis min... preparoli gravan aferon. Mi estis ĉe li je la duono antaŭ noktmezo. Li diris ke li ankoraŭ atendas iun kaj petis ke mi momenton eniru la kontoreton. Li

ŝlosis la pordon malantaŭ si. Iom poste mi aŭdis tumulton en la koridoro. Sekve, pasis kelkaj minutoj... »

« Kaj plue? »

« Tiam mi aŭdis voĉojn en la ĉambro de Maxton kaj bruon de io renversata kaj sekve... subite la pafon... mi... mi komence ne povis imagi ke ĝi venis el la ĉambro de Maxton kaj ekrigardis en la koridoron... ĉar mi vidis nenion eksterordinaran, mi perdis la kapon kaj fuĝis. Jen ĉio... »

« Nu! Jen ĉio. Kiaj aferoj estis ankoraŭ, je tia horo, traktendaj kun sinjoro Maxton? »

« Privataj aferoj. »

« Kiaj privataj aferoj? »

« Temis pri... grava financa transakcio. »

« Je noktmezo? » Kant mokis.

« Jes. Maxton volis tion. »

« Kaj sekve li ŝlosis vin en la kontoreto kaj lasis sin murdi. »

« Malgraŭe, ĝi estas la vero. »

« Kial vi fuĝis? »

« Mi timis kompromitiĝon en la skandalo. Mi angoris ĉar, se io okazis al Maxton, neniu kredus mian disvolvon. »

« Ĉu vi kredas ke ni nun rigardas ĝin vera? Kiucele la komedio pri via filo? »

« Invento de mia edzino. Mi... mi kredas ke ŝi eĉ suspektis min pri la murdo. Mi scias, estis eraro: kial mi ne tuj konfesis ĉion? »

« Kion vi riproĉis al Dubois? »

« Mi? Nenion. »

« Kial vi do premis butonon de la somera jako de Dubois en manon de Maxton? »

« Mi ne faris tion! Mi senkulpas! »

« Atentu, sinjoro Steinmann! »

« Vi ne imputos tiun murdon al mi... »

« Kial? »

« Vi ne havas pruvojn... »

« Tion ni vidis. »

« Mi ne faris... »

« Kial vi poste murdis Dubois? »

« Mi ne murdis lin. Ja kredu min. »

« Silentu, sinjoro Steinmann. Maxton estis murdita je proksimume la dudek tria kaj kvindek kvin. Du minutojn poste Doktoro Gulopez kaj mi estis en la koridoro. Neniu estis videbla. Nur vi, ĝuste vi enfuĝis vian kajuton. »

« Jes... Li profunde enspiris. « Mi kredas ke mi vidis la veran murdanton de Maxton... »

« Nu! » Oni facile komprenis ke Kant neniel fidis la sekvon.

« Tuj post la pafon, kiam mi rigardis en la koridoron, mi ankoraŭ ĝuste vidis iun moviĝi apud la ŝtuparo. Apenaŭ... tiel ke mi tiam ne plu pensis pri tio... sed nun... »

« Kaj kiu la viro? » Kant sarkasme demandis.

« Estis... estis ne viro... sed virino. »

Kant rimarkis kiel Doktoro Gulopez jetas rigardon al li. Ambaŭ pensoj iris al la fantomo, kiu la antaŭan vesperon, iom antaŭ la murdo, troviĝis sur la ferdeko.

« Ĉu vi rekonis la virinon? »

« Ne, estis tro mallume en la ombro de la ŝtuparo kaj, cetere, mi ege mlopas. »

« Je la kioma vi alvenis ĉe Maxton? »

« Akurate. Je la duono antaŭ noktmezo. »

« Kiam ree en via ĉambro? »

« Tiam estis precize la dudek tria kaj kvindek kvin. Mia edzino ne atendis min tiel frue. Ŝi ankoraŭ rakontis al mi la okazajon de Alex. Apenaŭ kvin minutojn antaŭe la Profesoro foriris. Ŝi tre koleris pri la afero. »

« Vi rakontis al ŝi kion vi plenumis? »

« Ne. Tio estas... mi plenumis nenion! Sinjoro Kant, ne torturu min per viaj insidoidoj. Mi diris al mia edzino nenion pri la aŭditajo. Nur ĉi-matene, kiam mi ekscelis ke... ke Maxton mortis, mi rakontis al ŝi kion mi travivis. »

« Kaj ŝi suspektis vin pri la murdo? »

« Ne, mi kredas nur poste, kiam vi enŝlosis Alex. »

« Kial ŝi suspektis vin? Al tio certe estis motivo? »

« Mi... mi ne scias... »

« Vi komprenas, sinjoro Steinmann, ke viaj deklaroj ne ege kredindas. »

« Jes... eble... »

« Prefere klarigu sincere, kial vi murdis Maxton! »

La demando ne provokis la plej etan reagon. La maljuna Steinmann senkuraĝe fiksrigardis la plankon.

« Nu... sinjoro Steinmann? »

La industriisto senespere suprenrigardis al la Inspektoro, kiu staris antaŭ li, kaj raŭke diris: « Ne, mi ne faris. Sed traktu min laŭ via plaĉo, nun ĉio egalas por mi. Ĉu mi estas arestita...? »

« Ne, provizore ne. Mi tamen akompanos vin. Mi ankoraŭ faros ion en via ĉambro. »

Steinmann senvole kaj rompote ekstaris por la martiriga iro al la propraĵaj ejoj.

(daŭrigota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 104, Turnhout.

HOTEL MONDIAL
15 Graaf d' Ursellaan 15
HEIST-AAN-ZEE
Nette kamers — Verzorgde keuken
Fijne dranken